

Lingwe Uniwersala de Zamenhof estus centjara

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-816/278, 1979 majo 31, junio 02
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-40/SRI-1979-40-B-5-278-816-1979-05-31-06-02-Claude-kaj-Andree-Gacond-Lingwe-Uniwersala-de-Zamenhof-estus-centjara.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Interlingvistoj ĝenerale asertas, ke la unua planlingvo, kiu sukcesis akiri subtenantojn, estis Volapük. Bernard Golden en artikolo aperinta en la centa numero de la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista demonstras, ke unu jaron antaŭ la naskiĝo de Volapük junuloj ekzerciĝis en Varsovio en la praktikado de la lingvo universala de Zamenhof. La plej detala dokumento pri Lingwe Uniwersala venas de la plumo de Ludoviko Lazaro Zamenhof mem. Ĝi estas la fama letero al Borovko. Ni citas:

A.- "En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiam "lingwe uniwersala" kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en la 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi."

Cl.- Lingwe Uniwersala do, estis unu el la eksperimentaj lingvoprojektoj super kiuj Zamenhof laboris antaŭ ol li finpretigis la klasikan formon de Esperanto en 1887. La familio Zamenhof, devenanta de la pola urbo Bjalistoko, translokiĝis al Varsovio fine de 1873, ĉar la patro Marko Zamenhof akiris pli lukran oficon en la cefurbo. Ludoviko frekventis la duan Filologian Gimnazion. Inter 1874 kaj 1878 li okupiĝis pri la internacilingva demando kaj faris diversajn provojn krei funkciantan lingvoprojekton. Finfine, li sukcesis kunmeti gramatikon, kompili vortareton kaj fari kelkajn tradukaĵojn en projekton, kun la konvinko, ke ĝi estas vivkapabla kaj uzebla. Li instruis ĝin al samlernejanaro kaj konatoj. Laŭ Edmond Privat "fervore ses aŭ sep ellernis la sistemon « Lingwe Universala ».

A.- En sia parolado ĉe la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906, Zamenhof denove menciis la rilaton de Lingwe Uniwersala al Esperanto. Ni citas:

Cl.- "...antaŭ dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de la vivo de la estonta Esperanto."

A.- Maimon en la verko "La kaŝita vivo de Zamenhof", Tokio, 1978, atentigas pri la graveco de la vorto "diversgentaj", ĉar tio signifas, ke inter la kolegoj de la juna Zamenhof estis ne nur judoj sed ankaŭ kristanoj.

Cl.- Pri la movado Lingwe Uniwersala Bernard Golden diras, ke ĝi havis sian lingvon, sian anaron kaj sian ideologion, se tiu termino povas ampleksi la etikajn kaj idealismajn celojn de la adoleskanto, kiu volis forigi malamikecon kaj malpacon, donante al la homaro rimedon por plifaciligi interkomprenadon. La Lingwe Uniwersala-movado havis sian himnon esprimantan tiun ideologion.

A.- En la gepatra loĝejo ĉe n-ro 28 de Nowolipie-strato en Varsovio, la 17-an de decembro 1878 ariĝis familianoj kaj kamaradoj de la 19-jara Ludoviko, kiu en tiu jaro estis en la lasta

klaso de la gimnazio. Per paroladetoj kaj kunkantado, kaj ankaŭ kuko kaj vino, ili celebris la Tagon de la Vivigo de la Universala Lingvo, kiel Zamenhof nomis tiun okazaĵon. Ni citas lin:

Cl.- "La 5-an de decembro 1878 (laŭ la julia kalendaro) ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj: Malamikete de las nacjes - Kado', kado', jam temp' esta' - La tot' homoze in familje - Konigare so deba'. En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas."

A.- Zamenhof mem komponis tiun himnon de frateco, kiu estas la sola teksto ekzistanta hodiaŭ en Lingwe Uniwersala.

Cl.- La sekvan jaron Ludoviko abiturientiĝis kaj iris al Moskvo por komenci siajn medicinajn studojn ĉe la tiea universitato. Lia patro devigis lin promesi, ke li ne okupiĝos pri sia lingvoprojekto ĝis la fino de siaj universitataj studoj. Kiam Zamenhof revenis al Varsovio en 1881 li malkovris, ke lia patro ne plenumis sian promeson gardi la manuskriptojn de Lingwe Uniwersala, li forbruligis ilin! Tio ne estis la sola bato, kiun la embria Lingwe Uniwersala-movado ricevis. Ni citas Zamenhof:

A.- "Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola."

Cl.- Bernard Golden registris ĝis nun tri el tiuj "apostoloj".

A.- Enciklopedio de Esperanto informas, ke unu el la lernintoj de Lingwe Uniwersala estis Aleksandro Waldenberg. Ankaŭ li studis la medicinon kaj praktikis kiel kuracisto en Varsovio. Li lernis Esperanton kaj laŭ korespondaĵoj de Zamenhof de la jaro 1906, Waldenberg estis la sekretario de la unua homarana aŭ hilelisma rondeto.

Cl.- Inter la familianoj, la sola persono, kiu povis esti ano de la Lingwe Uniwersala-movado estis Felikso, la plej aĝa frato de Ludoviko. En 1878 li estis 10-jara kaj unuaklasano en la sama gimnazio, kiun frekventis lia frato. Felikso poste lernis Esperanton kaj fariĝis konata verkisto de beletraĵoj sub la pseŭdonomo Fez. Edvardo Wiesemfeld, la redaktoro de la verkoj de Felikso Zamenhof, opinias, ke li lernis kaj uzis Esperanton antaŭ 1887. Povas esti, ke Felikso komencis interesiĝi pri planlingvoj jam en 1878. En siaj rememoroj li mencias, ke li estis membro de grupo de kolegoj, kiuj studis Volapük, kiam ĝi aperis. Tio okazis iom post 1880, kaj eble tiuj junuloj, kiuj scivolis pri Volapük, estis iamaj membroj de la Lingwe-Universala-rondo.

A.- Lastatempe Bernard Golden malkovris la nomon de tria rondano. Li estas Leo Wiener, kiu naskiĝis en Bjalistoko en 1862, tri jarojn post Zamenhof. Li venis al Varsovio en 1877 por daŭrigi siajn gimnaziajn studojn, sed li kaj Zamenhof ne estis en la sama lernejo. Tiam Leo Wiener, kiu estis multlingvulo, estis varbita de Zamenhof al la grupo lernanta la novan internacian lingvon. En 1880 ankaŭ Leo Wiener komencis studi la medicinon, sed post unu jaro ĉe la Universitato de Varsovio, li forlasis tiun karieron kaj iris al Germanio kun la celo fariĝi inĝeniero. Same fiaskis tiu profesia prepariĝo, do en 1882 li decidis elmigri al Ameriko. En Usono li instruis fremdajn lingvojn kaj fine atingis sukceson kiel profesoro pri slavaj

lingvoj kaj literaturo ĉe la Universitato Harvard. En 1907 du germanlingvaj artikoloj, kiujn li verkis pri universalaj lingvoj kaj Esperanto, aperis en berlina scienca revuo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis pri la projekto Lingwe Uniwersala de Ludoviko Lazaro Zamenhof gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond laŭ artikolo de Bernard Golden aperinta en la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*